Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 24/12/2020 Kvincentdeka eldono (unua eldono 20/09/2011)

Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo*

Google Translate *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo*

Esperanta Retradio *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

★★★

Surhavu vizaĝmaskon.

Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.

https://twitter.com/i/status/1245591199034929153

Homoj protektas aliulojn per la surporto de masko

★★★

La Manlia Esperanto-Klubo

La Manlia grupo, kunvenas je 10.30 atm ĝis 12tm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
La kunveno de 19a de decembro estis nuligita pro la kovid 19 reguloj *Roger Springer*

Artnivela kunkantado de koreaj esperantistoj dum Zamenhofa tago kun omaĝo al la Majstro

https://www.youtube.com/watch?v=nCZhiic7uNo Sendis al AE *Gabor Markus*

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917 .

P o r p l i b o n a k a j h u m a n a m o n d o .

“ĜI PROMESAS SANKTAN HARMONION” .

Mi tre samopinias kun la ĵusaj artikoloj de Vera kaj de Roger pri redesegno de la ekonomio. Mi samopinias ankaŭ kun mia artikolo pri la temo.

Ankaŭ alia negranda nacio, Norvegujo, kapablis redesegni, certograde, sian politikan socion. Kaj la grandaj nacioj plu aĉetas ĝian petrolon. Tiuj potencaj nacioj plu aĉetos la varojn de nia lando, Aŭstralio. Ĉar oni devas komenci ie, kaj kial ne en Aŭstralio? Sed kiuj organizos tion? La tasko estas grandega, ĉar ni bezonas unue konvinki, aŭ devigi, la politikistojn, kiuj ĝenerale favoras la nunan sistemon, per kiu ili riĉiĝas. Sed niaj agoj estas tre necesaj kaj gravaj.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Mi estas Esperantisto, kaj mi ne volas malpliigi la valoron de la batalo por Esperanto, sed ĝi estas multe malpli grava ol la batalo por ŝanĝi la ekonomian sistemon. Esperanto nur helpas tiun grandan batalon, sed fakte tre malmulte. Tiu helpo de Esperanto montriĝas precipe en la enhavo de Aŭstraliaj Esperantistoj, kaj tiu gazeto do estas la plej granda helpo de Esperanto al la batalo por pli justa socio.
Marcel Leereveld.

FOJNOFEBRO .

Por ne terni pro la fojnofebro, Vera povas peni la jenan:
Por fermi ĝin, premu per fingro sur la eksteron de tiu naztruo kiu plej tiklas, por peni ne terni.
Sed se ci ternas, faru tion en cian kubuton (se endome). *Marcel*.

LA KORONVIRUSO.

Ni bedaŭras por tiuj Esperantistoj kiuj loĝas en la marbordo de norda Sidneo pri la invado tie de la koronaviruso. Kaj mi akuzas la registaranojn kiuj permesis ĝin eniri en Aŭstralion.
Marcel.

LA C.I.A. VIRUSO .

Ŝajnas al mi, ke la Usona registaro decidis antaŭ kelkaj monatoj uzi Aŭstralion por ekzameni la reagojn de Ĉinujo al forta incitado. Aŭ Ĉinujo turmentadas Aŭstralion por ekzameni la eventualan reagon de Usono. Aŭ ambaŭ.
Sendube la neceso de Aŭstralio serĉi aliajn merkatojn por siaj varoj ne helpos Ĉinujon nek Usonon. Ĉiukaze mi esperas ke Aŭstralio pli komercu kun aliaj ĉinaj ŝtatoj, kiaj Tajvano kaj Singaporo. Kaj mi esperas ankaŭ ke Aŭstralio liberiĝos de la katenoj de la importoleĝoj kiuj nun favoras la usonajn eksportistojn kontraŭ “ni”. Cetere la mondo bezonas malpli da varoj kaj do malpli da komerco, por pluvivi. *Marcel*.

KRISTNASKO: VIVU LA MELEAGRO KAJ LA PORKO !

Tion oni diras je Kristnasko. Mi diras: “Longe vivu la meleagro kaj la porko”. Kiam la meleagro (*turkey*) kaj la porko ne vivas. ili estas kadavroj, kaj multaj homoj manĝas tiujn kadavrojn je Kristnasko. Por celebri la nekadavrecon de Jezuo, kiu laŭ ili pluvivas. Por ne manĝi Jezuon Kristo, ili manĝas kadavrojn. Kiam ili vivas, tiuj bestoj estas tre belaj kaj amindaj. Sed ne dum longa tempo ili vivas kiam ili posedatas de homoj. Kelkaj homoj traktas ilin ame kaj sen suferigo. Multaj homoj traktas ilin, ofte senpense, malagrable, speciale la komercistoj. Ne malofte tiu homa traktado estas kruela kaj kruelega, ĉar ili havas tiujn bestojn por fari profitojn monajn. Sed la multegaj homoj kiuj je Kristnasko manĝas tiujn kadavrojn, ne scias tion aŭ volas ne scii tion. Kaj ili ne bezonas scii tion, ĉar la kruela traktado okazas nevidate de la publiko. Tiuj kruelantoj ne juĝas la bestojn same kiel la homojn. Estas vera, ke la bestoj inter si, inter siaj specoj, agas kruele, ĉar ili estas nur bestoj. La gravo estas la karaktero de la homoj: se ili volas havi humanan karakteron, ili devas lerni esti humanaj, al

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

homoj kaj al la naturo. Kaj esti kruelaj nur, se tio estas necesa por savi sin mem kontraŭ la naturo.

Ekzistas alia tialo, kial mi ne volas manĝi bestojn. Tio estas pro ekonomiaj tialoj kaj por teni la mondon sana kaj pluekzistebla. Depende de la grundo kaj klimato, la kultivado de animaloj kostas al la tero pli aŭ multe pli da grundo ol la kultivado ante al plantoj. La rezulto estas, ke dum la homaro timige pligrandiĝas, la tero povos havigi malpli kaj malpli da loko por kultivi manĝaĵojn, kaj do la homaro senos de nutraĵo pli dum manĝado de animaloj ol de plantoj. La homoj do fariĝos pli kaj pli malriĉaj. En kelkaj partoj de la mondo la malriĉaj homoj jam devis komenci manĝi insektojn, da kiuj ja ankoraŭ estas multaj. Sed eĉ tiuj insektoj pli kaj pli ekstermiĝos. Do estas pli kaj pli necesa, ke ni ne manĝu, aŭ draste malpliigu, la manĝadon de animalaĵoj kaj do la uzon ante al la tero por kultivi animalojn. Manĝi viandon havas similan efekton kiel la poluciado kaŭzanta la klimatŝanĝadon, kaj same gravan.
Marcel Leereveld.

LA PAPOJ DE VERA .

Mi ŝatas la katolikan religion. Mi trovas ĝin la plej bela el ĉiuj eklezioj, ĉar ĝi substrekas kaj centrigas la amon por infanoj (Jezuo Kristo) kaj patrinoj (Maria). Ĝi tial estas tre humana religio, kaj la de Vera menciita pacema papo ne estas la nura. Kaj la katolika eklezio, parte pro la papoj, estas tre malfanatika kaj maldogma. Unu pruvo estas la jena.

Kiam juna, mi kelkfoje renkontis profesian bibliotekiston tre kleran kaj konatan en Eŭropo, kiu deziris ŝanĝi sian postenon. Hazarde la Vatikano bezonis novan ĉefbibliotekiston, kaj mia amiko anoncis sin havebla, krom al kelkaj aliaj, ankaŭ al tiu posteno, kvankam li estis ateisto, nereligiulo. Kiam la tiama papo intervjuis lin por la posteno, li estis impresata kaj tuj oferis la gravan postenon de Vatikana Bibliotekestro. Sed en respondo mia amiko menciis, ke la Vatikano ne povas uzi lin ĉar li estas ateisto. Sed la papo respondis "Tio ne estas problemo, ĉar en la katolika eklezio la homoj rajtas havi siajn proprajn opiniojn pri religiaj aferoj kaj estas liberaj eĉ ne kredi la Biblion nek en Dion. La nuraj kondiĉoj estas, ke li estu oficiale katoliko kaj ke li ne penu ateistigi la aliajn kristanojn, la ordinaran popolon, kiu bezonas la eklezion kun siaj mitoj kaj moraloj por esti feliĉaj. Verŝajne, Vera, tiu papo ne estas la sola papo inteligenta. Ankaŭ pro tio mi ŝatas la katolikan eklezion, kvankam mi trovas tre malĝusta ke ĝi havas monaĥojn kaj monaĥinojn negeedziĝintajn.
Marcel.

DAŬRIGA TEMPO .

Oni ĝuste nomas ĝin ankaŭ "Imperfekto", kvankam tiu vorto uzatas en la franca lingvo nur por la Pasinttempa daŭriga tempo *("Nous MANGIONS, quand l'avion est tombé à terre.").*

Ĵussemajne mi donis ekzemplojn de la Aktivvoĉaj Imperfektoj ("Daŭrigaj Tempoj") en kelkaj eŭropaj lingvoj. (en Esperanto: "Ni ESTIS MANĜANTAJ kiam la flugmaŝino teren falis"). Mi nun donos la Pasivvoĉajn formojn de la Daŭrigaj Tempoj (Imperfektoj) en tiuj lingvoj. La Esperantaj tradukoj estas: **1**). "La fiŝo plu estas manĝata nun", **2**) "La fiŝo plu estis manĝata, kiam Petro vizitis nin". **3**).. "La fiŝo plu estos manĝata, kiam Petro vizitos nin". Jen la Pasivvoĉaj formoj:

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

1) PREZENCO: *"The fish IS still BEING EATEN now"*
2) PASINTA : *"The fish WAS BEING EATEN, when Peter entered".*
3) FUTURO: *"The fish WILL BE BEING EATEN, when he comes back"*.

1) PREZENCO. *"Le poisson EST maintenant MANGé encore".*
2) PASINTA : *"Le poisson éTAIT EN TRAIN D'êTRE MANGé".*
3) FUTURO: *"Le poisson sera MANGé quand Pierre reviendra".*

1) PREZENCO: *"De vis WORDT nu nog steeds GEGETEN".*
2) PASINTA: *"De vis WERD nog steeds GEGETEN toen hij thuis kwam".*
3) FUTURO: *"De vis ZAL nog steeds GEGETEN WORDEN, als hij komt.".*

1) PREZENCO: *"Der Fisch WIRD nun noch immer GEGESSEN".*
2) PASINTA: *"Der Fisch WURDE noch immer GEGESSEN als er zuru'ckkam."*
3) FUTURO: *"Der Fisch WIRD noch immer GEGESSEN WERDEN als er kommt".*

En la Fururo ankaŭ la verbo de la Suborda Frazo povas esti en la Futuro.
En la Futuro ankaŭ la verbo de la Suborda Frazo povas esti en la Pasivo, sed kun alia teksto.

Marcel Leereveld.

★★★

La prelegserio rekomencos la 21-an de februaro 2021. Venontaj temoj estos anoncataj.

Se vi mem volus prezenti ion dum 2021, bonvolu sendi mesaĝon al Sandor Horvath, ĉe: prezidanto@esperanto.org.au. ***Jonathan Cooper,*** vic-prezidanto de AEA

★★★